# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

PLENUMITA 28/11/2019 Kvarcentkvindekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

## Entute 789,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **291,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **271,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **227,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*



## Gramatika serio "La Verbo en P.A.G.". N.ro.96




En $$ 176-213 P.A.G. priskribas, kiajn objektojn kaj adjektojn la verbo povas havi. La kernelemento de tiuj objektoj/adjektoj povas esti Substantivo aŭ Infinitivo aŭ Adjektivo aŭ Adverbo. La libro donas plurajn specojn de Objekto kaj multajn specojn de Adjekto. Ĝi tiel imitas la lingvistojn de la etnaj lingvoj. La tuta sistemo estas evitebla, eĉ evitinda, en Esperanto , kie la diversaj dudek specoj traktatas sammaniere. Sed ĝi helpas por plidikigi la libron. Mi poste klarigos, kiel en Esperanto mi simpligas la sistemon al unu paĝo, anstataŭ la kvindek en P.A.G. Tio eblas nur, ĉar Zamenhof ne donis malsamajn finaĵojn al la tridek objektoj/adjektoj, dum en etnaj lingvoj, speciale en la latina kaj rumana, la diversaj specoj havas specialajn finaĵojn aŭ prepoziciojn.

*Marcel Leereveld.*

## Ĉu estas Esperantisto vivanta en la mondo, pli aĝa ol Marcel?

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# *Gratulojn al Marcel Leereveld – 102 jaraĝa!*

Membroj de la Melburna Esperanto klubo, kaj Esperantistoj ĉirkaŭ Aŭstralio gratulas Marcel Leereveld, kiu atingis la grandan aĝon de 102 jaroj.
Lia datreveno estas 4a de decembro kaj niaj klubano festetos lundon vesperon je la 6 .30 ptm.
Fakte Marcel naskiĝis en la jaro kiam Zamenhof mortis kaj aktivis en la Esperanto Movado el de 1934.
Marcel kaj lia edzino, Alida, naskiĝis en Nederlando kaj translokiĝis al Aŭstali
En postenon en la Kvakera lernejo en Hobarto kie ili loĝis dum sep jaroj.

Marcel en 1947



Marcel en 2010



Reveninte al Melburno en 1961 kie li kaj Alida daŭre laboris por la Esperanto Movado. Li instruis Esperanton en altlernejo dum jardekoj kaj aktivis en AEA kaj la melburna klubo dum la pasintaj 60 jaroj.
Ni en Melburno estas ege bonsancaj pro lia sperta kaj malavara zorgo instrui kaj helpi nin kun nia Esperanta pliboniĝo.
Ni sendas ĉiujn bondezirojn al nia kara amiko kaj lia familio.

Se vi volas festi kun ni bonvolu kontakti Heather je erikino.48@gmail.com aŭ 0419895934 por pli da detalojn
Estraro de la Melburna Esperanto-asocio

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*



## **Multe da suno en mia ĝardeno.**

**KELKAJ PERSONAJ SCIEBLAĴOJ .**

Roger demandas, ĉu ekzistas en la mondo Esperantisto pli aĝa ol mi. Mi supozas ke jes, ĉar nuntempe homoj sufiĉe ofte pasas la unuan jarcenton.

Sed alia demando estas, ĉu ekzistas Esperantisto same aŭ pli aĝa ol mi kiu lernis Esperanton antaŭ ol mi lernis ĝin, en la jaro 1934? Laŭ mia scio ekzistas unu tia persono, en Hispanujo, kiu aĝas unu jaron pli ol mi kaj krome lernis Esperanton en 1933. Kaj en ambaŭ kazoj ni uzis Esperanton dum pli ol okdek jaroj. Ambaŭ naskiĝis en la fino de la unua mondmilito, en la tempo kiam Zamenhof mortis. Kaj ambaŭ travivis la Hispanan Civilan Militon kontraŭ la diktatoro Franco, sed mi nur unu tagon, ĉar la kontraŭ-Franka parto ne volis akcepti min kiel soldaton, pro la manko de kaj manĝaĵo kaj pafiloj, kaŭzata de la maldekstraj registaroj de Francujo kaj Britujo kiuj deziris ke Franco gajnu. Sed kvar jarojn poste tiuj registaroj devigis siajn landanojn militi kontraŭ Italujo kaj Germanujo, la amikoj de Francujo.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

La lingvo estas iom stranga pri mi, ĉar mi aĝe estas en la dua jaro de mia nova jarcento, sed mi tamen oficiale aĝas nur centunu jarojn. Kiel klarigi tiojn? Ses monatojn post mia naskiĝo mi estis en mia unua jaro sed mi ankoraŭ ne estis unujara. Kaj dum la pasintaj centdu jaroj (preskaŭ) mi milfoje preskaŭ mortis, komencante per la mortiga t.n. Hispana Gripo (ĝi tute ne estis hispana!), kiu regis en kaj post la fino de la milito kaj mortigis centmilojn, ankaŭ preskaŭ mian patrinon. Ŝia kuracisto ne plu volis prizorgi ŝin, ĉar li diris ke ŝi estas nekuracebla kaj certe mortos baldaŭ. Sed mia patro venigis neoficialan kuraciston, kiu vere interesiĝis pri la bonesto de siaj pacientoj, kaj li horojn laboris forte por igi la vezikon de mia patrino elverŝi la venenan urinon. Post tio ŝi resaniĝis. Ankaŭ tio estis milionobla hazardo en mia vivo. Ĉiu homo havas tiajn hazardojn en sia vivo, ĝis unu negativa hazardo mortigas ilin. Kiun danki pro la pozitivaj hazardoj? Ĉu la kuraciston, kiu nur faras sian taskon, kontraŭ mono. La specialistoj kontraŭ multege da mono. Ĉu danki la aŭtomobiliston, kiu haltis kiam ci senzorge transiris la straton? Estas pli facila, krei Dion kaj danki lin aŭ ŝin ĉiufoje kiam ci danki deziras. Sed ĉu maldanki Lin aŭ Ŝin tiam, kiam li kreas militojn? Mi kontraŭe dankas la Naturon, aŭ la Hazardon, kaj ankaŭ maldankas tiujn, por ke mi ne bezonu maldanki Dion pro ties nenombreblaj Misfaroj. Ĉu mia longa vivo estas unu el tiuj misfaroj? Multaj A.E.A.membroj opiniis tiel en la jaro 2006.

Okdek jaroj da Esperantado, kaj la mondo apenaŭ scias kio estas Esperanto. La Esperantistoj scias, kaj sentas sin tre gravaj por Esperanto. Ĝis ili forgesas pri la celo de Esperanto, kaj uzas Esperanton por sia propra plezuro, dirante "Ĉu gravas ke Esperanto ne estu perfekta?". Aŭ pli malbona: "Mi deziras ke Esperanto estu kia mia gepatra lingvo, ĉar tiel mi evoluis". Ili svarmas en U.E.A. kaj en la Akademio de Esperanto. Kvankam ili faras multege da laboroi por helpi Esperantoin "venki", neperfekta ĉar ili estas ege kleraj pri Esperanto sed nesufiĉe kleraj por kompreni ĉiun gramatikaĵon Esperantan. Kompatinda Esperanto!

*Marcel Leereveld.*

**LA ENHAVO DE PROPOZICIO .**

Ni komunikas kun aliaj homoj per la lingvo, kutime, kaj ni faras tion uzante vortojn kiuj kune sufiĉas por krei kompletan, se ne multenhavan, bildon. Ĉiu tia bildo enhavas certajn aspektojn, kiuj konsistas el minimume du kaj maksimume kvar elementoj. Tiuj kvar aspektoj de la bildo estas unue la ago, kiu okazas. Ankaŭ la stato de io estas ago, ago por resti kia ĝi estas. La dua necesa elemento de tia bildo estas la persono aŭ la aĵo aŭ la eco kiu kaŭzas la agon. Oni nomas ĝin la Subjekto. Kun certaj agoj, verboj, povas ĉeesti tria elemento, kiu nomiĝas la (gramatika) Objekto. Kaj la kvara, eventuala, elemento estas la diversaj cirkonstancoj en la bildo. Ili nomiĝas la Adjektoj, kaj la frazo povas enhavi iun ajn nombron da ili. Ĉiu el tiuj elementoj povas konsisti el unu aŭ pli da vortoj. Ĉiu tia tuto, la frazo, nomiĝas Propozicio. Ĉiu elemento de tia bildo, de tia Propozicio, kutime rekoneblas per speciala indikilo. Por la kernvorto de la Subjekto kutime estas manko de prepozicio kaj de akuzativo. Tiu de la Ago, nomita la Predikato, estas vorto kun unu el la finaĵoj –as, -is, -os-, -us, aŭ –u. Tiu de la Objekto estas la akuzativo kaj la manko de prepozicio. Kaj la Adjektoj havas plurajn karakterigilojn. *Marcel Leereveld.* .

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Esperanto-gramatiko

Karaj legantoj, kun granda ĝojo mi informas, ke nun mia malgranda Esperanto-gramatiko, kiu jam haveblas en dana, germana, angla, franca, itala kaj hispana versioj, nun ankaŭ en flandra/nederlanda versio.

Se oni legos la komentojn sur la paĝo http://esperanto-gramatiko.saluton.dk/esperanto-gramatiko-superrigardo/Esperanto-gramatiko%20informoj/ oni esperable konsentos, ke ne estas tro granda memlaŭdo mia la aserto, ke tiu kajero estas bonega helpilo por komencantoj, havebla je tre malalta prezo.



Pro tio mi petas vin ĉiujn rekomendi la kajeron al komencantoj kaj Esperanto-instruistoj.

Mi dankas pro via subteno. Amike, *Peter Weide*

---




# El Brizbano

Malgranda enrigardo en la biblioteko de la Brizbana Esperanto--Societo



*Peter Danzer*

---

**3ZZZ** En la elsendo de la 25a de novembro 2019 Grazina Opulskiene raportas pri la centjariĝo de la Esperanto-movado en Litovio . Vi ekscios kial la revuo " La Ondo de Esperanto" kaj personaj grandiozaj projektoj malaperas .

La kunvokanto *Franciska Toubale*

---

## Karaj kontribuantoj. Sen vi, AE ne povas ekzisti

*Merkredvespere mi sendas la novaĵleteron al la provlegantino por kontroli la lingvon kaj elsendas al la legantoj dum ĵaŭdo. Uzu ĝin por la reklamo de viaj semajnfinaj eventoj. Poste informu pri la sukcesoj de viaj kunvenoj en la sekvanta "Aŭstraliaj Esperantistoj" por montri ke viaj kluboj ekzistas kaj aktivas.*



---

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***